?inio kaj Kostariko prezidos ministran forumon kun la CELAC.

La ministroj pri eksteraj rilatoj de ?inio, Wang Yi, kaj de Kostariko, Manuel González Sanz, kunprezidos la unuan forumon ministerian ?inio-Komunumo de ?tatoj latinamerikaj kaj karibiaj (CELAC), kiu sesios la 8-an kaj 9-an de januaro.

Komuniko diskonigita de la ?ina ministerio sciigis ke la 7-an de tiu ?i monato okazos renkonti?o de la kunordigantoj por finpretigi la detalojn de la kunsido, kies malfermon en Beijing partoprenos la ?ina prezidento Xi Jinping.

Oni anka? anoncis la partoprenon en tiu ?i unua ministeria kunsido de la ?tatestroj de Kostariko, Luis Guillermo Solís, la ekvadora Rafael Correa kaj la venezuela Nicolás Maduro, krom la bahama ?efministro Perry ?ristie.

Tiuj ?i ?tatoj, kune kun Kubo, kunformas la kvaropon de la CELAC, kiuj reprezentas la anta?an (Kubo), la nuntempan (Kostariko) kaj la estontan (Ekvadoro) gvidantojn de tiu regiona organo. La kvara pozicio apartenas al delegito de la angloparolanta Karibio, kiu rotacias ?iun sesan monaton.

En tiu ?i unua renkonti?o je la nivelo de ministroj, la partoprenantoj diskutos pri la ?efaj kunlaboraj gvidiloj, la ?efaj areoj de kunlaboro kaj la temojn ligitajn al la kreado de institucioj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/42484-cinio-kaj-kostariko-prezidos-ministran-forumon-kun-la-celac

Radio Habana Cuba